Kontakto Dumonata gazeto de TEJO
N-ro 160 (1997:4)
M.-J. Kamali / Iran
ISSN 0023-3692



Kontakto Dumonata gazeto de TEJO
N-ro 160 (1997:4)
M.-J. Kamali / Iran
ISSN 0023-3692

facile

Blanka Koko kaj Ruĝa Koko

—— *Djavad Kamali, Irano*

Blanka Koko* kun siaj edzinoj vivis gaje kaj sen-ĝene en komforta kokinejo. Ĉiuj kokinoj, kaj ankaŭ la kokidoj, estimis kaj eĉ adoris* lin kiel reĝon. Blanka Koko sen-rivale* regis super la kokinejo kaj certe prizorgis sian familiaron.

De mateno ĝis vespero, nia koko multfoje kokerikis* kaj sin montris. La kokidoj certis, ke Blanka Koko estas la sola en la mondo, ĉar ĝis tiu tempo, ili ne vidis alian kokon. La kompatindaj kokinoj kredis, ke li estas la plej forta koko en la tuta regiono. Plej bongustaj manĝaĵoj apartenis ĉiam nur al Blanka Koko: Li, do, rajtis esti tre fiera* kaj kokeriki mulfoje dum tagnokto!



Sed alvenis tago, kiam la mastro de la farmo* aĉetis ruĝan kokon, portis lin al sia hejmo kaj tuj enirigis en la kokinejon. Blanka Koko, vidante lin, subite saltis de timo, ĉar la nova eniranto estis ja pli juna kaj pli forta ol li. Blanka Koko ekpretiĝis por ĉiel defendi sian regejon, sed Ruĝa Koko tuj atakis kaj post mallonga interbatalo venkis.

Ĉiuj kokinoj kun siaj kokidoj mire ĉeestis tiun sangan batalon. Ruĝa Koko lasis Blankan kaj fiere ekkokerikis laŭte*. La kokidoj ekestimis lian bravecon*; la kokinoj, vidante lian belecon, subvoĉe konfesis inter si, ke li havas pli da meritoj ol la malforta, maljuna kaj malbela Blanka Koko. La kokidoj, kiuj antaŭe timis Blankan, nun ekmokis lin kaj eĉ sin kuraĝigis por ataki la malfeliĉan Blankan, samkiel Ruĝa Koko faris. La eksedzinoj de Blanka, forlasante lin, ĉirkaŭis Ruĝan Kokon, kiu senĉese kantis.

Oni festis kaj ĝoje dancis meze de la nest*-aro. Ĉiuj elkore gratulis Ruĝan pro la nova regado. Blanka Koko, perdinte siajn posedaĵojn kaj edzinojn, ŝir-kore transdonis sian povon al la Nova Reĝo kaj poste sola ekvivis en malagrabla loko, angule de la kokinejo – sed ne longe.

Tiu ĉi mallonga rakonto memorigas al ni la faman proverbon*, kiu diras: "Ŝipon rompitan ĉiuj ventoj atakas".

PLILONGIGO DE LIMDATO POR LA ENIGMO *kongresoj*

Elfalis la limdata indiko de la enigmo aperinta en *KONTAKTO* n-ro 159 (1997:3). Kvankam multaj jam sendis sian solvon, ni tamen decidis plilongigi la limdaton ĝis la 30-a de oktobro 1997 por tiuj, kiuj (prave) dubis, ĉu temas pri konkurso.

adori: amegi
braveco: brile sentima antaŭ danĝero
farmo: domo kun kampoj kaj ĉio necesa por terkulturo
fiera: tro kontenta pri siaj meritoj
kokeriki: koko-krii
koko: birda, natura "vekhorloĝo"
laŭte: forta-sone, aŭdeble de malproksime
nesto: birdo-ovejo, birdo-hejmo
rivale: strebiĝe por superi alian
proverbo: popola diro pri iu vivo-vero